

Ricarda Huch,

## Sur monta alto

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Kien homa bru' ne venas,  
mi sub la ĉiel-senfin'  
sentas, ke konsole tenas  
senmakula mondo min.

Iĝas for sopiro, ĉia  
dezirado lasa min,  
kaj la font' de ploro mia  
tute simple fermas sin.<sup>2</sup>

*Traduko de la Germana poemo "Auf Bergeshöhe" de RICARDA HUCH (\*1864-07.18 – †1947-11-17) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 1984-06-05.*

*MR-097-1 / Arg-757-1521 (2013-01-04 18:52:59)*

*Pri la poetino vidu la vikipedian retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Ricarda\\_Huch](http://eo.wikipedia.org/wiki/Ricarda_Huch).*

---

<sup>2</sup>aŭ:

Iĝas for sopiro, ĉiaj  
kordeziroj lasas min,  
kaj la font' de larmoj miaj  
tute simple fermas sin.